Jaro IX. N-o 7. MONATA Septembro 1926.

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20·—; fremdlando Kĉ 25·— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pollando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

## AŬTUNO VENIS!

Admono al ĉiuj Esperantistoj!

Jes, aŭtuno venis! Pasis la ferio kaj la societoj estas preparitaj por nova laboro. Multaj mendis jam propagando-materialon de la Asocio kaj jam malfermis kursojn por komencantoj. Kie ĝis nun nenio fariĝis, tie tuj komencu la entreprenojn!

La anoj de la societoj restis kelkajn monatojn for de la kunvenoj. Sed nun ekfloru nova vivo en la kunvenejoj! La komitato devas fari la komencon. Persona partopreno de konscienca prezidanto garantias plenan kunsidon de la ceteraj komitatanoj. Revizio de la membrolistoj, interkonsiloj pri varbado de novaj membroj kaj decido pri aranĝo de granda membra kunveno. La komitatanoj varbas por ĝi individue de persono al persono, tial la vizito estas bona. Programo: Salutoj, protokolo, parolado kaj raportoj, interkonsiloj pri farotajoj, kurso, regulaj kunvenoj, aliaj proponoj, fermo. Kaj poste ekfunkcias la Amuza Fako.

Ĉar — krom la propagando — la ĉefa tasko de ĉiu Esperanto-societo estas perfektigado de la membroj, estas devo aranĝi regulajn ĉiusemajnajn (ĉiam la saman tagon) kunvenojn. Ĉiu membro devas zorgi, ke li estu libera por tiu vespero. La bona kaj regula partopreno en tiuj kunvenoj dependas de la gvidanto, kiu devas scii ĝustan kaj interesan manieron de gvidado. Laŭ sperto la demando pri la stilo kaj prononco de la lingvo precipe interesas ĉiujn: komencantojn kaj progresintojn. Estas utile fari enketojn aŭ almenaŭ debatojn pri tiu temo. Kelkaj grupoj akiris en tiu afero ĝojigajn rezultojn.

Afiŝoj, alvokoj kaj artikoloj en gazetoj (gazetara servo!) kaj ĉefe persona varbado de ĉiuj membroj devas prosperigi ĉiujare bone vizitatan kurson por komencantoj. Kaj la komencantoj devas varbiĝi por perfektiga kurso, la grupoj bezonas ja novan rekrutitaron. — Okazas ofte, ke anoncas sin novaj interesuloj, kiam la kurso estas jam progresinta, tiujn ni ne devas simple malakcepti. Same ne estas aprobinde, se oni ne volas aranĝi anoncitan kurson, ĉar nur tre malmultaj aliĝis. Per tio oni forpelas novajn varbotojn. Estas trovebla maniero ankaŭ individuojn konatigi kun la verko de Zamenhof. En tiaj eksterordinaraj okazoj estus bone, se oni povus turni la interesulojn al skribaj kursoj. Tio estas sekuriĝo koncerne la akiron de novaj membroj, kaj tiu ĉi problemo devas grave interesi ĉiun grupon!

Nur se la grupo regule kaj sisteme propagandas, se ĝi, plie, ebligas al siaj anoj bonan okazon por perfektiĝi, se la membroj vere posedas la lingvon kaj se la kursoj estas regulaj, nur tiam la grupo vere plenumas sian celon por la utilo de siaj anoj kaj la disvastigo de la verko de Zamenhof. *V. E.*

# LITERATURO

*K. ORLOV:*

## LECIONO

Oni ne povas diri, ke estis tie du malamikaj tendaroj. Ne — staris simple unu kontraŭ la alia du partioj, kiuj sin reciproke ne komprenis. Unuflanke altkreska, pala instruistino de Lernejo por geknaboj — aliflanke, multe pli multnombraj, dudek knaboj kaj knabinoj, la unuaj kun mallonge tonditaj haroj, la knabinoj kun malgrandetaj rigidaj harplektaĵoj. La dudek kapoj estis ĉiuj egalmezure klinitaj maldekstren, la langoj iom montriĝis inter la malgrandaj dentoj.

Akraj sonoj de la moviĝantaj skribiloj, interrompitaj de ekĝemoj, ekĝemoj de malpeziĝo kaj de streĉo, aldone odoro de malsekiĝinta inko — per tio estis la granda malheleta lernoĉambro plena.

Antaŭ la fenestro, hele lumata de la suno, balanciĝis en sufoka somera vento robinioj*), kaj ia birdo kantis el sia malgranda gorĝo tiel laŭte, ke oni preskaŭ timis ĝian subitan morton de apopleksio.

El malproksimo, de la rivero, estis aŭdebla kriado de banantaj infanoj kaj la suno lasis surgliti siajn varmajn radiojn el la blua, vasta ĉielo karese sur iliaj kapoj. Mia dio, kiel bela estis ĉio!

Oni volus krii, kanti, fajfi — oni ŝatus kuregi eksteren — en la varmegon de la strato, por fari la plej kuraĝajn saltojn.

Sed oni ne povas. Oni devas lerni . . .

Subite, inter la ĝenerala diligenta laboro, venis al Kruglikov ia penso, plivere demando:

Kial ni propre devas lerni? Ĉu ĝi estas vere necesa?

Kruglikov estas maltimulo kaj li portas siajn pensojn ĉiam sur la pinto de sia lango. Tiel li ankaŭ efektive demandis la instruistinon, tien kaj reen irantan en la lernoĉambro:

„Kial ni propre lernas?“

Liaj okuloj grandiĝis kaj iom elstariĝis, parte pro scivolo, parte ankaŭ tial, ĉar li kuraĝis tiel maltrankviligan demandon.

„Vi estas stranga komikulo“, ridetis la instruistino. „Kial? Por ke ni estu saĝaj kaj kleraj kaj por ke ni povu klarigi al ni ĉion, kio okazas ĉirkaŭ ni.“

„Sed se oni ne lernos?“

„Tiam pereos la kulturo.“

„Kio estas — la kulturo?“

„Jes, tio estas malfacile klarigebla. Plej bone mi ĝin klarigos per ekzemplo. Se iu el vi estus estinta en New York . . .“

„Mi estis . . .“ pepis iu malgranda voĉo de malantaŭe.

Ĉiuj turniĝis surprizite al la kuraĝa mondvojaĝantino. Kio? Kiel?

En ĉiu lernejo ŝajne embuskas ia speco de malgrandaj lernejaj diabloj inter la benkoj kaj pro li trompiĝas la senkulpaj lernantoj, kaj sendube estis li, kiu pinĉis Natalia Paŝkova en la brakon kaj flustris al ŝi: „Diru, ke vi estis! Diru tion do!“

Kaj — ŝi diris tion.

„Hontu, tiel mensogi, Natalia Paŝkova. Kiam vi do estis en New York? Kaj kun kiu?“

Natalia estus nun plej volonte malaperinta sub la tero. La diablo ŝin tiris je la lango; nun estis ĉio preta, kaj la vorto ne estas pasero, kiun oni povus ree kapti.

„Vere . . mi . . . estis. Antaŭhieraŭ . . . kun la patro.“

Mensogo! Ĉio estis la plej ordinara mensogo! Ŝia patro estas ja mortinta. Kaj antaŭhieraŭ, same kiel hodiaŭ, ŝi estis ĉi tie, en la lernejo.

Natalia estante kun sia malveraĵo kaptita de la tuta klaso, falis, trafita de ĝenerala malŝato, kun ploro en sian benkon.

„Do infanoj, se iu el vi estus en ĉi tiu ĉefurbo de Ameriko, li ekvidus nubogratantojn, elektran lumon, radion, lifton, ĉio nur danke al — la kulturo. Danke al la cirkonstanco, ke kleraj homoj venis tien. Kaj ĉu vi scias, kiel aĝa estas tiu ĉi urbo? Cent ĝis cent kvindek jarojn. Ne pli.“

„Kaj kio estis tie antaŭe?“ demandis Rušin Andrej.

„Antaŭe? Antaŭe estis tie netrairebla arbaro, trakreskita de lianoj. Kaj en tiu arbaro estis multe, multege da sovaĝaj bestoj: panteroj, lupoj, tigroj, krom tio vastegaj ebenaĵoj tie estis, sur kiuj paŝtis sin boacoj, bubaloj kaj sovaĝaj ĉevaloj . . . Krome loĝis tie indianoj, kiuj estis ankoraŭ pli teruraj ol la bestoj, ĉar ili mortigadis la blankulojn, detiris la haŭton de iliaj kapoj. Nun vi povas kompari, kiam estis pli bone, ĉu nun aŭ tiam. Praarbaroj, sovaĝaj bestoj, indianoj aŭ — larĝaj stratoj, elektra lumo, nenia postesigno de sovaĝaj . . .“

La instruistino diris ĉion ĉi preskaŭ per unu elspiro. Triumfe ŝi rigardis nun de supre siajn subulojn.

„Ĉu vi nun komprenis? Diru mem, kio

*) Akáty.

estas pli bona, la kulturo aŭ ĉi tia vivo? Kruglikov, diru, kiam estis pli bone, nun aŭ tiam?"

Kruglikov stariĝis, pensis momenton kaj murmuris:

„Tiam."

„Kion? Pripensu tamen, malgranda knabaĉo! Tiam oni havis nenian komfortaĵon, ĉie bestoj, indianoj, kaj nun: lifto, domoj! Diru do, kiam estis pli bone?"

„Tiam."

„Kara dio . . . Polorackij, diru al ni vi, kiam estis pli bone, nun aŭ tiam?"

Polorackij rigardis la instruistinon singarde de la flanko — li ekpensis, ĉu ŝi donos al mi por tio la noton Unu? . . Poste li diris kviete kaj certe:

„Tiam estis pli bone."

„Kion? Sliznikov?"

„Pli bone estis tiam."

„Kio do okazis kun vi — ĉu vi havas egiptan mallumon en la kapoj? Ĉi tie vi havas domojn, elektran lumon, ĉion kion vi deziras.

„Por kio domojn?" demandis cinike la dika Fitukov.

„Por kio? Kie do vi volas dormi?"

„Mi? Ĉe bivaka fajro. Mi envolvos min en felon kaj dormos. Krome estis tiam tiaj grandaj veturiloj."

Kaj li nun rigardis la instruistinon same triumfe kiel antaŭe ŝi lin.

„Sed estis mallume, malvarme, timige..."

La lernanto Zavaldajev diris malŝate al la iom ekscitita instruistino:

„Mallume? Kaj por kio estas la fajro antaŭ la tendo? Da ligno estas sufiĉege — plena arbaro."

„Kaj subite venos sovaĝa besto . .?"

„Pro tio la gardisto kun pafilo devas bone atenti. Malnova afero."

„Kaj la indianoj sin alŝovos de malantaŭe al la gardisto, uh . . ."

„Kun ili oni povas fumi la pipon de paco, estas ankaŭ bonaj, honestaj gentoj . . ."

„Ekzemple Delavaroj!" venis voĉo de malantaŭe. „Ili amas la palvizaĝulojn. Kaj en okazo de neceso oni ja ankaŭ povas forgalopi sur sensela mustango."

La tonditaj kapoj kuniĝis kaj ilia voĉa miksaĵo similis al pasera ĉirpado sur la robiniaj branĉoj.

„Kaj en la urbo pordisto estis dispremita de lifto . . . Jen vidu la urbon!"

„Hieraŭ knabo estis transveturigita de la tramo."

„En la urbo estas simple terure enuige," resumis Sliznikov.

„Vi estas simple malbonaj knabaĉoj! Vi ne estis ankoraŭ en praarbaro, inter sovaĝaj bestoj, tia estas la afero."

„Mi estis tie!" elkriis Natalia Paŝkova. La lerneja diablo denove ne lasis ŝin trankvila.

„Ŝi mensogas!" elkriegis ĵaluze la ceteraj infanoj. „Kial vi ĉiam mensogas? Se vi estis tie, kial vin ne formanĝis la sovaĝaj bestoj? Parolu do!"

„Ion similan ili ja ne manĝos" murmuris Kruglikov.

„Kruglikov!!"

„Kial ŝi senĉese mensogas... Vi ja mem diris, ke mensogi estas peko."

„Atentu do, ankoraŭfoje, infanoj! Vi ne komprenis min versimile plene. Kiel oni povas diri, ke antaŭe estis pli bone; oni havis tiam nek buteron, nek panon, nek sukeron, nek kukojn."

Kukojn!!

Tiu frapo trafis, sed Kruglikov ankaŭ ĝin rebatis.

„Nu, kaj la daktiloj, bananoj? Ĉu vi ilin forgesis? Ilin oni ne bezonas aĉeti, ili kreskas tie de si mem kaj kostas nenion. Estas ankaŭ panarboj, vi tion ja mem rakontis, kaj kano. Oni pafas al si bubalon, sekigas viandon kaj oni vivas kiel granda sinjoro."

„Krome estas ja ankaŭ riveroj!" aldonis juna, sperta fiŝkaptanto. „Necesas sole kurbigi pinglon kaj oni povas kapti fiŝojn kiel longe oni volas kaj kiom ajn da ili."

La instruistino premis ambaŭ manojn sur sia mallarĝa brusto, ŝi kuris de unu al alia, ŝi incitiĝis kaj priskribis la belaĵojn de la grandurba vivo. Sed ĉio estis mallonge kaj lerte rebatita. Ambaŭ partioj videble ne komprenis sin. La kulturo degelis per atakoj de la indianoj, bivakaj fajroj, panteroj, fiŝoj.

„Vi estas tute simple ne tolereblaj strataj knabaĉoj!" murmuris fine la venkita instruistino, montrante tiel la nelogikan pensmanieron, kiu estas propra al la malforta sekso. „Vi volas nur pafi kaj ludi indianojn. Ni demandos nun la knabinojn . . . Klaŭdia Kaŝkaina, kion vi pensas? Kiam estis pli bone, tiam aŭ nun?"

La respondo estis kiel fulmo el la serena ĉielo.

„Tiam," respondis la pala, lentuga knabino kaj balancis mallongan stumpon de sia harplektaĵo.

„Kiel? Kial? Diru, kial? Kial?"

„Estis herbo . . . mi ĝin amas . . estis

tiam floroj."

Kaj turnante sin al la fakulo pri botaniko, ŝi demandis lin:

„Estis ja tiam floroj?"

„Kiom ajn vi volas!" respondis la fakulo. „Grandegaj tropikaj, ekzotikaj. Kun belegaj bonodoroj! Kaj vi povis preni da ili, kiom vi deziris."

„Kaj en la urbo oni ricevas hodiaŭ por unu rublo eĉ ne unusolan, nur iom tolereblan rozon."

La venkita instruistino kolektis kolerege siajn lastajn fortojn.

„Katja Ivanenkova diros al ni, kiam estis pli bone."

„Tiam."

„Kial???"

„Estis tiam bubaletoj" flustris la malgranda knabino dorlote, klinante la blondan kapeton.

„Kiaj bubaletoj? Ĉu vi iam vidis iun?"

„Diru, ke jes," flustris Paŝkova, delogita de la diablo.

„Ne, mi ne vidis ilin", konfesis la malgrandulino. „Sed versimile ili estas tiel amindaj."

Kaj fermante la okulojn ŝi aldonis:

„Tia bubaleto . . . lane mola . . . tute malgranda . . . kun tiel dolĉa buŝeto . . . Mi ĝin prenus sur la genuojn kaj kisus ĝian nazeton."

Kruglikov, la fakulo pri sovaĝa vivo, silentis diplomate pri la nefarebleco de la sentimentala deziro de Ivanenkova, kaj la instruistino siblis per tremanta voĉo:

„Bone! Se vi ĉiuj estas tiaj, mi nun ne plu interparolos kun vi! Tuj daŭrigu la kalkuladon. Kiu ne solvos la taskon, devos resti ĉi tie. Eĉ ĝis la nokto."

Silento ekregis.

Kaj ĉiuj solvis la taskon, sole ne la malgranda Katarina Ivanenkova kun sia pura koro; ĉar malgrandeta bubaleto ĉiam staris inter ŝiaj okuloj kaj la ardeza tabuleto . . .

Ŝi restis sidi ĝis mallumiĝo . . .

El la rusa trad. *I. Melnikov.*

---

**Dluhujete-li předplatné, zašlete je ihned po obdržení tohoto čísla.**

**Jen tím umožníte pravidelné vycházení svého esperantského listu.**

---

## EL ĈEĤOSLOVAKIO

*Se iu el tiuj ĉi koncizaj notoj speciale interesas iun el niaj eksterlandaj legantoj, la redakcio povas peri detalan informon.*

**Alois Jirásek,** plej ŝatata ĉeĥoslovaka verkisto, aŭtoro de valoraj romanoj kaj noveloj el diversaj epokoj de ĉeĥoslovaka historio, atingis la 23-an de aŭgusto sian 75-an jaron. Lia ampleksa verkaro estas tre ŝatata legaĵo de tuta nacio. La tago estis festita en tuta lando, specialajn bondezirojn sendis prezidanto Masaryk kaj aliaj eminentaj ĉeĥoslovakoj.

**Loĝantoj en Ĉeĥoslovakio** kreskis de la lasta nombrado en 1921 je 631.000 personoj. La tuta respubliko havas nun sume 14,244.000 da loĝantoj.

**Praha sen fumo.** Oni multe klopodas por fari la aeron en Praha laŭeble plej pura kaj speciala Oficejo por ekonomia hejtado estis por tiu celo starigita. Post nelonge estos Praha tute senigita de la fumantaj fervojaj lokomotivoj, ĉar komencis jam laboroj por elektrigo de ĉiuj fervojoj en la urbo kaj ĝia malproksima ĉirkaŭaĵo. En la stacidomoj eklaboris la unuaj akumulatoraj lokomotivoj. La laboroj estis solene inaŭguritaj en ĉeesto de la registaro kaj de inĝ. Křižík, la nestoro de elektraj fervojoj en Ĉeĥoslovakio.

**Ĉeĥoslovaka tabaka monopolo ŝtata** produktis dum la jaro 1925 en siaj fabrikoj 8.735,000.000 da cigaredoj, 469,000 000 da cigaroj, 225.000 kg da cigareda tabako, 8,000.000 kg da pipa tabako kaj 800 000 kg da flartabako. Same kiel en la jaro 1924 kreskis konsiderinde ankaŭ en 1925 la produkto kaj konsumo de cigaredoj kaj malkreskis vendo de cigaroj kaj de pipa tabako.

**Eksterlandanoj studas en Praha.** En la ambaŭ universitatoj de Praha studas ĉiam pli alta nombro da eksterlandanoj. Pasintjare estis inter ili 4641 rusoj, 1359 poloj, 360 sudslavoj, 109 hungaroj, 79 aŭstroj, 39 germanoj, kaj 1204 alinacianoj, multaj bulgaroj, sed ankaŭ angloj, francoj, diversaj azianoj kaj afrikanoj. Kvankam unu el la universitatoj en Praha estas germana, studas ĉi tie malmulte da eksterlandaj germanoj.

**Ĉeĥoslovakaj aviadistoj** gajnis la unuajn premiojn dum la internacia vetflugado aranĝita dum aŭgusto en la franca loko Orly. Dro Lhota sur la ĉeĥoslovaka maŝino de la fabriko Avia Praha kun la motoro Walther Praha estis la unua kun 607 25 punktoj, Fritsch sur ĉeĥoslovaka flugaparato el sama fabriko kun 598 08 punktoj la dua. Poste venis francoj, belgoj kaj angloj. La venkoj estas grava internacia sukceso de la ĉeĥoslovaka aeroplana industrio. Alia ĉeĥoslovaka aviadisto kapitano Stanovský revenis 23./7. de sia longa rondflugo, dum kiu li haltis en jenaj lokoj: Istres (apud Marseille), Barcelona, Rabat, Fez, Casablanca, Lagos, Lisboa, Madrid, Paris, London, Bruxelles, Rotterdam, København, Stockholm, Utti, Helsinki, Tallinn, Riga, Kaŭnas, Warszawa, Bucuresti, Stambul, Angora, Salonichi, Athenai, Roma, Udine kaj Praha.

**Baťa en Zlín** (Moravio), la plej granda ŝuofabriko sur la eŭropa kontinento, daŭre pligrandigas siajn entreprenojn kaj okupigas hodiaŭ 5000 laboristojn.

**Ekspozicio de skulptaĵoj.** En septembro estis fermita granda ekspozicio de la verkoj de Jan Štursa,

# BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

NUMERO 13. SEPTEMBRO 1926.


## ČAS PŘÍTOMNÝ, MINULÝ A BUDOUCÍ

*Tedy dnes něco o nás, o venkovských...*

*Naše minulost byla slavná. Paradovali jsme na obálkách své esperantské revue hezkým počtem jmen. Bylo hodně těch klubů klubíčků a kroužků. —*

*Bylo — nebylo.*

*Zlí jazykové tvrdili, že prý „nia sankta afero — progresas sur papero", ale my byli.*

*Naši vůdcové v Praze ani netušili, co zmatku vnesl mezi nás boj Unie a Asocie! Komu věřit? Kde je právo? Která zkušební komise je ta pravá? Znali jsme Vás v Praze a neznali. Smutno nám bylo...*

*Válka světová! Na troskách Unie a Asocie vzniká Svaz československých esperantistů! Krásná přítomnost!*

*Jsme, už sice ne na obálce, ale po celé republice. Dobýváme úspěchů, ví se o nás, ale my reptáme. Praha je naším terčem. Kritisujeme, příliš kritisujeme.*

*Ruku na srdce: Máme jazykově i věcně vzorný časopis (jediná a velká vada jeho je nepravidelné vycházení), ale kdo o něm ví? Jak jej podporujeme? Proč zanikl „Esperantský Zpravodaj"? Co chceme?*

*Jaká bude budoucnost esperantského hnutí v Československu? Čekáme zázraky? Od koho? Chceme trvalé úspěchy anebo lacinou slávu?*

*Věřím, že sta a sta mozků, pracujících a organisujících své velké i drobné dílo, pochopí, že v jednotě je síla a že není nás málo, jen chtít!*

***Esperantistka.***

## EL Ĉ. A. E.

La komitato de ĈAE kunsidis sabate la 18. Septembro en kafejo de Obecní dům en Praha. Dum trihora kunsido estis traktitaj pluraj aferoj, el kiuj ni mencias kelkajn.

Radio. S-ro Hromada raportas pri la ĝisnunaj faritaĵoj. En majo ĈAE sendis al Radiojournal Praha ampleksan leteron, en kiu ni atentigis pri la poresperanta rezolucio de I. internacia kongreso de radio-amatoroj en Paris 1925, pri rezolucio de nia Bratislava kongreso, prezentis argumentojn por esperanto en radio kaj atentigis pri radio-disaŭdigoj en ĉiuj ĉefaj stacioj eŭropaj. La kopion ni sendis al la ministerio de poŝtoj.

Komence de junio ĈAE sendis novan leteron, atentigante en ĝi pri la poresperanta rezolucio akceptita en la I. kongreso de ĉs. radio-amatoroj en Brno, la 30/5 26. En julio ni petis respondi ambaŭ leterojn. Vane, Radiojournal silentas. En majo stacio Praha elsendis ĉeĥan kaj germanan paroladon pri ido, poste germanan, de D-ro Bischitzky, pri esperanto. Nian peton pri la ĉeĥa poresperanta ĝi ignoris. Ĝi ankaŭ ĝis nun ne aprobis la decidon de la stacio Brno, ke tiu ĉi elsendos esperantokursojn. Dum ido-kongreso estis elsendata ido-parolado kaj kelkajn tagojn poste parolado esperanta de S-ro Vincent, angla skolto, pri Skolta ligo esperantista. En septembro ĈAE sendis al R. J. rezolucion de regiona kunveno en Bohdaneč.

La komitata kunveno de ĈAE decidis do gravan entreprenon, pri kiu ĉiuj kluboj kaj ĉiu Delegito de UEA estos informitaj per speciala cirkulero.

Kvankam pluraj samideanoj jam ankaŭ private skribis al RJ, ni rekomendas, ke konstante radio-amatoroj postulu de RJ favoran sintenon al esperanto.

La kunveno plie debatis pri gazetara servo. Oni konstatis, ke ĝi bone funkcias en proksimume 50 gazetoj provincaj kaj estis interkonsentita laboro en Prahaj ĵurnaloj kaj fakaj revuoj.

Propaganda semajno. S-ro Hromada raportas, ke en la regiona kunveno en Jaroměř, en julio, iuj riproĉis al ĈAE pro nearanĝo de verda semajno. Li respondis, ke